XXIX ORDINARA DIMANĈO -18an de oktobro 2009

LA FILO DE HOMO VENIS POR DONI SIAN VIVON KIEL ELAĈETON POR MULTAJ – Comentario al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM.

[En tiu tempo] alproksimiĝis al li Jakobo kaj Johano, filoj de Zebedeo, dirante al li: Majstro, ni deziras, ke, kion ajn ni petos de vi, vi tion faru por ni. Kaj li diris al ili: Kion vi volas, ke mi faru por vi? Kaj ili diris al li: "Permesu, ke ni povu sidi, unu dekstre de vi kaj la dua maldekstre, en via gloro".

Sed Jesuo diris al ili: "Vi ne scias, kion vi petas. Ĉu vi povas trinki la kalikon, kiun mi trinkas? aŭ esti baptitaj per la bapto, per kiu mi estas baptata? Kaj ili diris al li: Ni povas. Kaj Jesuo diris al ili: La kalikon, kiun mi trinkas, vi trinkos, kaj per la bapto, per kiu mi estas baptata, vi estos baptitaj; sed sidi dekstre de mi aŭ maldekstre, tion doni ne apartenas al mi; sed ĝi estas por tiuj, por kiuj ĝi estas preparita".

Kaj aŭdinte, la dek ekindignis kontraŭ Jakobo kaj Johano. Kaj Jesuo, alvokinte ilin al si, diris al ili: Vi scias, ke tiuj, kiuj pretendas regi la nacianojn, kondutas kiel sinjoroj super ili, kaj iliaj granduloj ekzercas aŭtoritaton super ili. Sed ne tiel estos inter vi; sed kiu volas esti granda inter vi, tiu estu via servanto; kaj kiu volas esti la unua inter vi, tiu estu sklavo de ĉiuj. Ĉar la Filo de homo venis, ne por esti servata, sed por servi, kaj por doni sian vivon kiel elaĉeton por multaj".

La trian, lastan kaj definitivan fojon Jesuo estis anoncinta ke en Jeruzalemo Li estos murdita de la sinedriuloj. Sed la disĉiploj tion ne komprenas, fakte la evangeliisto skribas, "alproksimiĝis al li Jakobo kaj Johano", ili estas la du disĉiploj al kiuj Jesuo donis negativan kromnomon, Boanerghes [Boanerges] kiu signifas "Filoj de la tondro", kiuj petas de li "Majstro..."- ili nomas lin 'Majstro', sed vere ili ne Lin aŭskultas, ili ne lernas de Li, ili ne sekvas Lin - "... ni petas", per granda aroganteco, tiu estas pretendo, tio ne estas vera peto "ke, kion ajn ni petos de vi, vi tion faru por ni".

Kaj Jesuo diras al ili: "Kion vi volas, ke mi faru por vi? " Kaj Jen ilia peto: "Permesu, ke ni povu sidi, en via gloro...". Jesuo ĵus diris ke en Jeruzalemo li estos murdita de la sinedrianoj kaj ili pripensas la triunfon. Kiel oni povas esti tiel blinda kaj tiel surda?

La religia ideologio povas murdi, senefikigi kaj atrofii la aŭskultadon kaj la vidadon de Jesuo. "Unu dekstre de vi kaj la dua maldekstre". Kiel en la monarkioj estis la reĝo sidanta centre kaj kiuj havis la povon post li sidis dekstre kaj maldekstre de li; do, kvankam Jesuo jam estis anoncinta sian morton, siaj disĉiploj tion ne komprenas kaj ne akceptas.

Tiam Jesuo diras: "Vi ne scias, kion vi petas. Ĉu vi povas trinki la kalikon..." – la kaliko, en la hebrea tradicio simbolis la morton, la martiriĝon - "kiun mi trinkas". Kaj tri fojojn Jesuo uzas la esprimon 'bapti'. 'Bapti' por la homoj estis simbolo je morto, 'morto al la pasinteco'. La bapto de Jesuo estis simbolo je akcepto de la morto en la estonteco.

Poste li diras al ili: “Ĉu vi povas esti baptitaj per la bapto, per kiu mi estas baptata?“, do, ĉu vi povas alfronti tian morton? Ili respondas, per granda aroganteco: “Ni povas”. Poste ni vidos ke fronte al la faktoj,kontraŭe ili ĉiuj ekfuĝos.

Nu, Jesuo diras: ”Bone ankaŭ vi iros renkonten al tiu martiriĝo” kaj Li denove ripetas tri fojojn la esprimon ‘bapti’ (bapti, baptata, baptita) – mi rememoras ke la nombro tri simbolas tion kio estas definitiva. “sed sidi dekstre de mi aŭ maldekstre, tion doni ne apartenas al mi; sed ĝi estas por tiuj, por kiuj ĝi estas preparita”, nome ĝi estas por tiuj kiuj en la momento de la elprovo, estos kapablaj Lin sekvi. Kaj, en la momento de la elprovo, kontraŭe, Jakobo kaj Johano ne kapablos sekvi Jesuon.

Skribas la evangeliisto: ”La aliaj dek”. Kial tiu superflua substreko? Ni scias ke ili estas dekdu, se du el ili faris tiun peton al Jesuo estas memkomprenebla afero ke temas pri la aliaj dek. Sed la evangeliisto tion substrekas por rememori la grandan tragedion de Izraelo kiu estis la skismo okazinta post la morto de Salomono. Post la morto de Salomono, ties filo, Reĥabeam vidis alveni ĉe si delegitaron de la plejaĝuloj kiuj diris al li: ”Vidu, via patro estis senkompata diktatoro, li suĉis nian sangon el niaj vejnoj, vi klopodu esti malplipeziga ol via patro!”.

Reĥabeam, kiu estis ambicia kiel sia patro, sed ne tiel inteligenta kiel li diris: ”Se mia patro vin premis per etfingro mi vin premos per pugnobato”.

Tiam, ekde tiu momento, el la dekdu triboj kiuj konsistigis la regnon de Izraelo eĉ dek disigis el li kaj restis al Reĥabeam nur sian tribon kaj flanke de li tiun de Benjemen. Ekde tiam estigis skismon kaj ruinigon de la izraela popolo.

Tiel la evangeliisto rememoras tiun eventon per la aliaj dek “kiuj ekindignis kontraŭ Jakobo kaj Johano”- ili ekindignas ne ĉar ili estas ŝokitaj de ties peto, sed ĉar ili ĉiuj volis tion peti de Jesuo, ĉiuj pripensis sidi dekstre aŭ maldekstre de Li, estas la ambicio kiu regas kaj agitiĝas la tuta grupo. Do, ekzistas la risko ke la ambicio konduku ĝis la skismo kaj, sekve al ruiniĝo de la komunumo.

Tiam jen grava instruo de Jesuo “kiu alvokis ilin al Si”. Kial Li ilin alvokas al Si? Li ilin alvokas ĉar ili estas malproksimaj de Li. “Kaj Li diris al ili: ”Vi scias, ke tiuj, kiuj oni konsideras kiel regantojn de la nacianoj...” – ‘oni ilin konsideras, sed tiajn Jesuo ilin ne konsideras - “de la nacianoj kondutas kiel sinjoroj super ili, kaj iliaj granduloj ekzercas aŭtoritaton super ili”.

Jesuo havas negativan bildon pri tiuj kiu havas la povon. Kaj tri fojojn Jesuo substrekas: ”Ne tiel estos inter vi”. Kiu ajn imitadon de la regado ekzistanta en la medio, interne de la komunuumo de la diŝciploj de Jesuo estas suspektiga.

“Sed ne tiel estos inter vi; sed kiu volas esti granda inter vi, tiu estu via servanto”, do, se vi volas esti granda metu vin je la servo de ĉiuj, se vi volas esti la unua, estu sklavo de ĉiuj. Jesuo ne toleras ke en Sia komunumo estu iuj kiu sin metu super la aliajn.

Kaj poste, jen la grava revelacio kiu tute ŝanĝas la vizaĝon de Dio: ”Ankaŭ la Filo de homo”, nome la homo kiu posedas la dian kondiĉon, “venis, ne por esti servata, sed por servi”, jen la bildo de Dio. En la religioj eĉ en tiu juda, Dio estis servita de la homoj, Dio petis la servadon de la homoj. Nu, kun Jesuo ĉion ŝanĝas ĝisfunde; kun Jesuo Dio ne plu petas esti servita, sed estas Li kiu Sin metas je la servo de la homoj.

Kaj la servo, al kio ĝi celas? Ĝi celas “Doni sian vivon kiel elaĉeton”; la elaĉeto estis la prezo kiun oni pagis por liberigi iun de sklaveco. Nu, Dio, en Jesuo Sin metas je la servo de la homaro por ĝin liberigi de ĉion kio ĝin malhelpas havi plenan dignon kaj fariĝi Lian Filinon.